



aktuala

34-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono). Informoj : ...

<http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> www.esperanto.be www.esperanto.net <http://eo.eventeoo.net>
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri Lidia Zamenhof (4a fina parto)
- Paĝo 2 - Membra Malrekordo de UEA
- Paĝo 3 - Unuaj Paŝoj de Esperanto en Belgujo
- Paĝo 8 - Unua Franca Esperantisto de 1888
- Paĝo 9 - Geraldo Mattos pri Mia Esperantisteco (unua parto)
- Paĝo 12 - Poemaro: Pessoa, Geraldo Mattos, Alberto Garcia
- Paĝo 13 - Nuligo de IJF pro tertremo kaj kunveno en Vatikano
- Paĝo 15 - Esperantaj Eventoj kun belgularoj

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Aprilo 2009

- 1 Kostjantin Demjanenko el Ukrainio pri iŝtiologio en Maro Azova
- 8 Michael Cwik gvidas diskuton pri lingva strategio
- 12 Paska dimanĉo
- 15 Hélène Falk-Bracke pri kanzonoj kaj folkloraj kantoj de Zamenhof-a tempo
- 22 Jan Amadori pri kaprompiloj, ludenigmoj, puzloj
- 29 Marcel Delforge pri vojaĝoj en Pollando

Majo 2009

- 6 Marc Demonty pri temoj de la euro-moneroj el ĉiuj landoj
- 13 Bernard-Regis Larue pri lastaj novaĵoj de la planedo Marso
- 20 Hélène Falk-Bracke pri kvizoj
- 27 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci.

Junio 2009

- 3 Semajna kunveno
- 10 Semajna kunveno
- 17 Semajna kunveno
- 24 Semajna kunveno lasta antaŭ grupa ferio dum Julio kaj Aŭgusto

LA VIVO DE LIDIA ZAMENHOF, FILINO DE ESPERANTO (4a fina parto)

La libro mutas pri la dato de ŝia reveno al Pollando, sed ŝi estas en **Varsovio** je la **unua de septembro 1939**, dato de la germana invado de Polio. La sieĝata Varsovio kontraŭstaros dum tri semajnoj, je granda kosto : i.a. la 25an de septembro brulbombo detruas la Zamenhof-domon. La urbo kapitulacas tri tagojn poste, kaj jam la 4an de oktobro, **Adamo** estas arestita en la juda hospitalo, kune kun sia edzino Wanda kaj fratino Zofia, kiuj laboras samloke. **Lidian** oni arestas hejme. **Ludwik** ne estas arestata ĉar li estas malsana kaj oni suspektas ke povus esti tifo. Anstataŭ lin, oni arestas Henrikon Minc, edzon de Janina, la fratino de Wanda... Oni ne plu liberigos la du virojn : ili estos mortpafitaj kune kun 100 ostaĝoj en januaro 1940.

La arestitaj virinoj estos liberigitaj, sed ili ne plu havas domon ! Ili trovos novan hejmon en la **geto** al kiu oni sendas ĉiujn judojn, ne nur de Varsovio sed de la tuta Polio. Pri la vivkondiĉoj, vi certe estas dokumentataj. Mi aldonos ke tie, Lidia instruas la anglan, Zofia kaj Wanda havas sufiĉe da laboro kiel kuracistoj, la juna Ludwik laboras en oficejo.

La celo de la Germanoj estas ekstermado de la juda popolo. Multaj jam mortas en la geto, pro malsato aŭ malsano, sed tio ne sufiĉas. Komence de 1942, ŝarĝvagonoj kaj trajnoj regule kondukas getanojn por « relokigo al Oriento » - fakte al la koncentrejoj, en kiuj oni lasas portempan vivon nur al la plej fortaj.

En aŭgusto 1942, Wanda kun sia fratino Janina kaj filo Ludwik estas sur la listo, sed ili trovas rimedon eskapi ! Ili sukcesas transvivi sub la nomo **Zaleski** ekster la geto ĝis la fino de la milito.

Zofia, propravole, ne volas eskapi, ĉar laŭ posta rememoro de ŝia nevo « ŝi estis konvinkita ke la deportatoj bezonus kuracistan helpon kiun ŝi provizos al ili. » Lidia estas forkondukata en septembro al nova ekstermejo, proksime de **Treblinka**, en kiu oni ne selektas la plej fortajn sed tuj mortigas per venengaso la tutaĵon de la alvenantoj. Ĉar la cindrigaj fornoj ne funkcias sufiĉe rapide, oni aldonas subĉielan bruligadon sur grandaj feraj kradoj. Inter la cindroj, tiuj de Lidia. Lidia mortis la 5-an de septembro 1942. Ŝi estis 38 jaraĝa.

Lidja (laŭ la esperanta skribmaniero) kreskis kiel solinfano, ŝi estis dujaraĝa kiam ŝia frato, Adamo, komencis studi medicinon en Lausanne; Zofia sekvis lin unu jaron poste.

Tiam, la kutima lingvo hejme estis la pola kaj Lidja obstine rifuzis lerni esperanton. Minaco de ŝia patrino « vi ĉeestos la venontan kongreson nur se vi parolas esperante » decidigis ŝin eklerni nian lingvon. Ŝi lernas ĝin tiel obstine ke baldaŭ ŝi parolas kaj skribas flue.

Plurfoje, la libro mencias la kontraŭ-judan etoson de la Kristanoj. Mi povas paroli nur pri mia propra sperto. Estas dum kateĥisma instruo ke mi lernis ke « ĉar la Judoj savis la vivon de Barabas kaj ne la vivon de Jesuo, ili mem asertis 'Lia sango refalu sur nin kaj nian idaron'. » Tiun aserton mi legis ankaŭ en la evangelio laŭ Sankta Mateo (27-25) kaj ankaŭ en la tekstoj de la famaj Pasionoj de J.S.Bach). Ĝis nun, mi miras ke Kristanoj ne vere konscias ke Jesuo estis judo.

Hélène Falk

MEMBRA MALREKORDO DE UEA

En 2008 Individuaj Membroj estis 5702, Aliĝitaj Membroj estis 12492

En 2008 UEA registris la plej malgrandan nombron de individuaj membroj (IM) post la Dua Mondmilito: **5702**, tio estas je 11 malpli ol la antaŭa malrekordo el 2002 kaj je 309 malpli ol en 2007. Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kiu pro la Jokohama UK estis la plej granda lando laŭ la nombro de IM en 2007, entute 856, sed en 2008 ĝi falis al 402. La perdo en Japanio estis do 454. Ĉar la tuta perdo estis 309,

la cetera mondo kompensis do unu trionon de perdo en Japanio. Francio rekonkeris la unuan lokon kun 583 IM (+35); la dua estis Germanio kun 534 IM (+20). Unu el kvin IM de UEA (19,5%) estis en tiuj du landoj. Aliaj landoj kun multe da IM estis Brazilo (337; -7), Usono (314; -16), Nederlando (254; +5), Rusio (209; +58), Italio (208; +4), Belgio (159; +9), Svedio (154; -10), Britio (153; +4), Hispanio (147; +4), Finnlando (136; -20), Ĉinio (127; -14), Pollando (120; +20), Hungario (113; +13), Danio (97; +6), Svislando (85; +4), Ĉeĥio (82; +6), Vjetnamio (78; -5) kaj Kanado (75; +2).

La tuta membraro de UEA tamen kreskis per 706, ĉar la aligitaj membroj (AM) plimultiĝis el 11477 al **12492**, danke al Hungario, kiu en 2007 pagis por 100 AM sed en 2008 por 1348. (AM estas tiuj anoj de la landaj asocioj, kiuj ne estas IM de UEA.). Hungario liveris sume 1461 membrojn (IM + AM) kaj estis la lando kun plej multe da UEA-anoj. Aliaj landoj kun multe da AM estis Ĉinio (1051; +/-0), Germanio (832; +69), Italio (777; +40), Japanio (677; -314), Francio (553; +221), Pollando (500; +/-0), Belgio (480; -33) kaj Usono (341; -44).

Pozitiva estis la kresko de Societo Zamenhof al 166 anoj (+39). Revuo "Esperanto" havis 3860 pagitajn abonojn (-157) kaj "Kontakto" 845 (+100).

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 318

UNUJAJ PAŜOJ DE ESPERANTO EN BELGUJO

Armand DETHIER, la unua belga esperantisto, direktoro de *L'Annonce Timbrologique*, estis apotekisto el **Lieĝo**. Li en **1892** raportis favore pri volapukaj kursoj en **Lieĝo** kaj **Verviers**, sed, en junio **1893** li, pro aperinta artikolo pri Esperanto, fare de **Louis de Beaufront** en alia franca filatelista revuo *La Gazette Timbrologique*, entuziasme esprimas admiron por Esperanto, kiun li baldaŭ poste ankaŭ lernas. Li raportas pri tiu lernado en sia revuo en septembro **1893** (4-a jarkolekto, n-ro 43). Lia nomo aperas en la dek-sesa adresaro - kiu listigas la aliĝojn inter oktobro **1893** kaj **1895**.



Interesaj dokumentoj de Marcel Delforge pri la unuaj paŝoj de Esperanto en Belgio. Bildo 1: *La langue internationale – peut-elle être le latin?* Skanita foto de libro de Louis de Beaufront. Bildo 2: Libro de 1898 de eminenta aktivulo Charles Lemaire. Bildoj 3, 4: Fotoj de Charles Lemaire (1863-1926) esperantiĝis en 1897. Bildoj 5, 6: Du ekzempleroj, posedo de Marcel Delforge, de 1909 kaj 1913 de la antverpena oficiala organo de Belga Ligo Esperantista, nomita "Belga Esperantisto" kaj fondita en 1908.

Charles François Alexandre LEMAIRE, la patro de Esperanto en Belgio, (naskiĝis en **1863**, esperantiĝis en **1897**, mortis en **1926**) estis esplor-vojaĝisto en **Meza Afriko**. Iam fine de la **19-a jarcento** eŭropaj esploristoj ekpenetris en la plej forajn regionojn de Afriko. Unu inter ili estis la belga oficiro Charles Lemaire. Li meritas specialan atenton ne nur pro siaj esplorvojaĝoj kaj siaj detalaj raportoj, sed ankaŭ pro verkado de kelkaj interesaj libroj, krome kiel multflanka organizanto kaj socia aganto, kaj ĉefe kiel unua direktoro de la Belga Kolonia Altlernejo (kiu funkciis en **Antverpeno** de 1920 ĝis 1962). Aparte interese estas, ke li estas la persono, kiu faris la unuan veran varbadon por Esperanto en Belgio. Se oni deziras iom pli bone koni la homon

Lemaire, iu aparte bona informfonto estas la dulingva libro *Tra Mez-Afriko - A Travers l'Afrique centrale*, eldonita en 1906 de la belga presisto (kaj Esperanto-aktivulo) **Antoon Jozef Witteryck**. Tiu ĉi 85-paĝa libro, abunde ilustrita per fotoj, kun paralelaj tekstoj en la franca (maldekstraj paĝoj) kaj en Esperanto (dekstraj) kaj kun (ankaŭ dulingva) enkonduko kvarpaĝa fare de **Hippolyte Sébert**, prezentas la tekston de prelego kiun Lemaire faris en **Genevo** je la fino de la **2-a Universala Kongreso de Esperanto (1-an de septembro 1906)** en la Victoria-salono de la Wilson-palaco, kaj al kiu la ĝeneva publiko estis invitita. En tempo, kiam nur tre malmultaj eŭropanoj vojaĝis al Afriko (kaj ne multaj revenis vivaj) kaj kiam la publiko estis sub la impreso de la hororrakontoj de la vojaĝoj de H. M. Stanley, tia prelego havis grandegan sukceson, kaj tiu sukceso donis al tiu libro kaj tiu prelego iun kroman signifon, kiu multe kontribuis al la famo de la preleginto. Multaj frazoj en tiu (nun malfacile trovebla) libro informas nin pri la tiama centra Afriko, pri la propra sinteno de Lemaire rilate al la afrikanoj, pri lia opinioj, kiujn la tiama eŭropa publiko havis pri Afriko, tiu nekonata kontinento, pri lia propra konduto, k.a. Klare evidentiĝas, ke entute li admiras kaj laŭdas la afrikanojn; li kondamnas la konduton de multaj nekompreneblaj eŭropanoj, sed li ankaŭ defendas la civilizan politikon de la eŭropaj koloniantoj. El la tuta priskribo montriĝas komprenema kaj sociema homo kun idealismaj sed ankaŭ realismaj sentoj kaj ideoj.

Lia junaĝo: Charles Lemaire naskiĝis la 26an de januaro 1863 en **Cuesmes**, tiam mizera vilaĝo de karboministoj en la **valona** parto de Belgio. Jam frue li perdis siajn gepatrojn kaj devis travivi malfacilajn cirkonstancojn. Lia inteligento tamen altiris la atenton de iu instruisto, kiu zorgis, ke la knabo poste povis transiri al la mezgrada lernejo, kie li atingis tre bonajn studrezultojn. La sola serioza karierebleco por la malriĉa junulo estis la armeo. Li iĝis vicleŭtenanto en **1883** post sukcesaj studoj en la Armea Altlernejo. Jam tie montriĝis liaj grandaj intereso pri matematiko, kartografio, geografio, termezurado kaj meteorologio. Lin vokis foraj horizontoj. Kaj unu el la bonaj eblecoj estis disponigi sin por kariero en la **Kongo-ŝtato**, kiun la belga reĝo **Leopoldo la 2-a** estis establinta en meza Afriko.

Tasko en la Kristal-montaro: En novembro 1889 Lemaire veturis la unuan fojon al tiu Kongo-ŝtato. Lia tasko estis trovi pli konvenan vojon trans la montaro inter Matadi (la lasta atingebla loko ĉe la Kongo-enfluejo) kaj la fora Stanley-lago, de kie la Kongo-riverego estas navigebla. Oni nuntempe povas apenaŭ imagi la vojaĝcirkonstancojn en la tiama Kongo. La interno de la lando ja havas abundon da navigeblaj riveroj, sed la majesta Kongo-rivero, pasante tra la Kristal-montaro, atingas la oceanon per sinsekvo de 32 akvofaloj. Por atingi la landinterton, ĉiu novalveninto, eĉ karavano, devis piede marŝi de Matadi ĝis **Kinŝaso** laŭ pli ol 400 km da vojetoj, kiuj kondukis de unu vilaĝo al alia; kaj ĉiu bagaĝo devis esti portata tra tiu distanco fare de skipoj da **portistoj**, kiuj estis pretaj fari tion kontraŭ pago (feliĉe ili neniam mankis, sed la disciplino estis alia faktoro). Ankaŭ ĉiaj motoroj kaj aliaj pecoj por finkonstrui ŝipojn en la landinterno devis esti portataj surdorse aŭ surkape, ĉar neniu el la kutimaj ŝarĝbestoj, eĉ ne azenoj, konvenas por tiu klimato, kaj cetera ne ekzistis konvenaj vojoj. Montriĝis do absolute necesaj iu pli konvena vojo, kelkaj survojoj ripozejoj kaj gastejoj, garantioblaj skipoj da portistoj kaj survoja sekureco. Danke al sia bona scio pri termezurado kaj sia kapablo konvinki la homojn al laboro kaj al kunlaborado, Lemaire sukcesis en malpli ol unu jaro instali la bezonatan pli praktikan vojon trans la montaro kaj iom reguli la funkciadon de la transportoj kaj vojaĝoj.

La juna distriktkomisaro: Lia bona rezulto ne restis nerimarkita. En 1890 la 27-jara Lemaire jam akiris la rolon de komisaro de la administra distrikto Equateur

(Ekvatoro), teritorio 12 fojojn pli granda ol Belgio. Tial li iris instali sin en Equateurville (loko poste nomita Coquilhatville, nun Mbandaka), apud la enfluejo de la rivero Ubangi, ĝuste sur la ekvatoro. Pro sia juna oficira ambicio li regis tie per fera mano, konduto pri kiu li poste hontis. La jam frua intereso de Lemaire pri lingvoj kaj la konscio ke la lokaj eŭropanoj (inter kiuj la plejpartaj ne estis belgoj) bezonis kompreni la indiĝenajn lingvojn, instigis lin redakti vortaron de la plej ĝeneralaj frazoj. Li povis kolekti tiajn frazojn en ses gravaj indiĝenaj lingvoj (inter kiuj la **lingala** kaj la **svahila** kaj la franca kaj angla. Post sia reveno al Belgio li eldonis tiun frazaron en formo de kajero, kiu havis grandan sukceson kaj famigis lin. Dum jardekoj ĝi estis reeldonita kaj mirinde servis por ĉiuj novuloj en la Kongo-ŝtato kaj en la posta Belga Kongo. Iun tagon Lemaire intervenis en kverelo. Kuglo trafis lin en la krurono. En la tiama Kongo-ŝtato eŭropaj kuracistoj apenaŭ ekzistis; kaj la sola hospitalo troviĝis en Boma apud la oceano. Suferante pro la vundita kruro, li devis ŝipe atingi Kinŝason kaj de tie, laŭ la vojo de li konstruita, kriple atingi Matadi kaj poste Boma. Tie li estis operaciita kaj devis longan tempon resti en la hospitalo. Per tio finiĝis en la fino de 1894 lia unua restado en Afriko.

Aktiva en la hejmlando: La operaciita kruro longe malhelpis Lemaire repreni gravan laboron en Afriko. Sed oni bezonis liajn sciojn pri la geografio de la montaro inter Matadi kaj Kinŝaso, ĉar Stanley estis konvinkinta Leopoldon 2an konstruigi fervojan linion inter la du urboj, nepre necesan por povi pli facile atingi la landinterton. Tial Lemaire akompanis dum kelkaj monatoj en **1894-1895** la konstruantojn al la koncerna regiono por tie per siaj konsiloj kontribui al tiu grandega laboro. Sed la ceteran tempon en Belgio li bone uzis por socia laboro por malsanaj infanoj, planado de ripozejo por revenantaj Kongo-ŝtatfunkciuloj, k.a. En **1897** la **Tutmonda Ekspozicio** estis en Bruselo, kaj Lemaire iĝis la ĝenerala sekretario de la organiza komitato. Leopoldo 2a volis kapti la okazon por montri sian Kongon al la kritikema publiko. Aparta pavilono pri Kongo estis konstruita en **Tervuren** (15 km ekster Bruselo) montrante la civilizan laboron kaj la naturajn riĉaĵojn de tiu lando. Eĉ kompleta vilaĝo kun ĉ. 300 konganoj (inter kiuj ankaŭ pigmeoj) estis en la ekspozicio. Lemaire ricevis la taskon venigi tiujn homojn al Belgio, kaj li bone sukcesis en tio. Kun ĉagreno li tamen devis konstati, ke multaj inter ili tre malbone toleras la okcident-eŭropan klimaton, eĉ meze de la somero, kaj ke nostalgio estas por ili terura fenomeno. Lia ekspozicia preparlaboro estis apenaŭ finiĝanta, kiam Leopoldo komisiis al li alian taskon: prepari la vojaĝon de skipo de esploristoj, kiu sub la gvido de **Adrien de Gerlache** vojaĝos al **Antarkto** per la ŝipo Belgica. Ankaŭ tiun taskon li sukcese plenumis. Kaj la reĝo ne lasis lin trankvila, ĉar li bredis ambician planon: trovi pli facilan vojon al la suda parto de la Kongo-ŝtato el orienta Afriko. La planita esplorekspedicio devus pasi de la buŝo de Zambezio en Portugala Afriko (la nuna Mozambiko) tra la de Britio postulitaj teritorioj, atingi la Tanganjika-lagon, de tie direkti sin al Katango (suda Kongo) kaj poste tra la lando atingi la okcidentan marbordon. En la preparado de tiu ekspedicio, kiu pasus tra portugala kolonio poste tra brita, tra la teritorioj de tiom da afrikaj popoloj kun ties diversaj lingvoj, la lingvosentema Lemaire iun tagon eksciis ion pri iu facila internacia lingvo, kiu tiam estis propagandata en Francio. Li mendis lernolibron, tuj trastudis ĝin kaj entuziasmis pri la ideo.

Letero en la unua vespero: En **1897** Lemaire hazarde eksciis pri iu internacia lingvo, rapide lernebla el franca broŝuro de iu **Louis de Beaufront**. Li trastudis ĝin en unu posttagmezo kaj vespere jam skribis en Esperanto al de Beaufront. La baldaŭan respondon li tute komprenis, kio konvinkis lin pri la valoro de Esperanto. Li

komunikis sian entuziasmon al anoj de Cercle Polyglotte ("multlingva rondo"), kies estrarano li estis, kaj en decembro 1897 prelegis al ili pri tiu mirinda Esperanto. Estante unu el la administrantoj de nova liberala ĵurnalo Brusela, *Le Petit Bleu*, Lemaire povis konvinki la redakcion publikigi lian prelegon. Ĝi aperis en ok sinsekvaj eroj, de 17 dec. 1897 ĝis 1 jan. 1898, kaj poste ankaŭ kiel libreto: *L'Espéranto, solution triomphante du problème de la langue universele* ("Esperanto, triumfanta solvo de la problemo de la universala lingvo"). Li konvinkis influajn riĉulojn, i.a. Solvay kaj Lambert, finance kontribui por distribui la libreton al universitatoj, bibliotekoj k.a. Poste li atingis ke *Petit Bleu* aperigu ĉiusemajne tekston paralele en E-o kaj la franca. Kiam en aprilo **1898** li (nun kapitano) kun kvar akompanantoj forvojaĝis al Afriko, li lasis en Belgio ĝermantan Esperanto-movadon.

Afrika ekspedicio kaj rezultoj: Sed jam en aprilo 1898 Lemaire devis forvojaĝi al Afriko por trakontinenta esplorvojaĝo. 500 tagojn post la elŝipiĝo ĉe la orient-afrika marbordo en Mozambiko la **25-an de majo 1898** la ekspedicio atingis la okcident-afrikan bordon. Ĝi estis perdinta tri el la kvin anoj survoje. Ili estis trairentaj 3000 km, la plejparton piede. De centoj da lokoj Lemaire nun posedis la mezurojn de la temperaturo kaj de la ekzakta geografia situo, kaj nociojn pri la ĝenerala stato de la vegetaĵaro. Li estis ekzakte difininta kie estas la limoj inter la riverbaseno de Zambezio kaj tiu de Kongo-rivero (nomata Lualaba en sia supera parto). La scio pri tiu limo inter la du basenoj estis vere grava, ĉar tiu geografia linio iĝus laŭkonsente la landlimo inter la Kongo-ŝtato kaj la brita Rodezio.

Ree en la hejmlando: Reveninte en Eŭropon en **1900** Lemaire uzis sian tempon por redakti siajn raportojn, prelegi en universitatoj kaj sciencaj asocioj, montri per **diapozitivaj** la plej interesajn fotojn de siaj vojaĝoj, verki librojn k.a. Li krome disponigis multan tempon al la revigligo de la iom dormanta nacia Esperanto-movado, organizante prelegojn de eksterlandaj vizitantoj, pledante ĉe altrangaj amikoj, akirante organizi propagandon en gravaj ekspozicioj k.a.; krome li lanĉis je propraj iniciatoj kaj kostoj la revuon **Belga Sonorilo**. Sed Leopoldo 2a jam bezonis lin por plia ekspedicio. Ĝia celo estis prezentata kiel studado de etnologiaĵoj, bestoj kaj plantoj de nord-orienta Kongo; sed la vera celo estis la aktiva ekzistado de Kongo-ŝtataj funkciuloj en iu kontestita parto de la teritorio, nome Bahr-el-Ghazal.

La norda ekspedicio: Fine de 1902 Lemaire forvojaĝis kun pluraj belgaj funkciuloj al Bahrel-Ghazal. Tie li faris tre intereŝajn observojn, pri kiuj cetere atestas la bildoj, kiujn li montris dum sia prelego en Genevo en 1906: la belaj Azande-virinoj, sed ankaŭ la Azande-princo kies du manoj estis forhakitaj ĉar li estis aŭdacinta tuŝi la edzinojn de sia patro. Post pli ol trijara restado en tiu regiono, speciale en la **enklavo de Lado**, en la komenco de 1906 la ekspedicio revenis en Belgion, veturinte sur **Nilo** tra **Sudano** kaj **Egipto**. Denove estis la tempo por raportoj, prelegoj kaj Esperanto-aktivado. El tiu tempo devenas lia, por tiu periodo skua frazo: "... negroj estas homoj posedantaj plene la proprecojn de la homaro, sekve ĝiajn rajtojn, ĝiajn devojn."

La neokazinta ekspedicio: Sed jam vokis lin nova ekspedicio, kiu forvojaĝus en januaro 1907: denove al tiu kontestata parto de la lando (speciale al Lado-enklavo) por garantii tie la supozitajn rajtojn de Leopoldo 2a, kiu deziris ke la Kongo-ŝtato (baldaŭ cedota de li al la Belga ŝtato) havu pasejon al Nilo. Tamen intertempe la diplomatio serĉis aliajn vojojn, kiuj kondukis al interparolado en **Londono** inter reprezentantoj de la Kongo-ŝtato, de **Francio** kaj de **Britio**. La monda opinio tiam estis forte kontraŭ-Leopolda. La bildoj (ne nur tiuj de Lemaire) de la forhakitaj manoj, la asertoj pri kruelaj fare de la funkciuloj, la Casement-raporto pri la neglektoj levi la vivkondiĉojn de la indiĝenaj popoloj en tiu privata ŝtato de la belga reĝo,

skandallibroj aperintaj en **Usono**, k.a., kvazaŭ komplete malebligis konsenton pri tiu **avido** de Leopoldo 2a al atingo de Nilo. Iu diplomatia solvo evitis kompletan rifuzon, sed la rezulto estis kvazaŭ nula por la belga reĝo. Kiam Leopoldo 2a eksciis pri sia malvenko, li ekhavis unu el tiuj **paranojaj** koleroj, kiuj karakterizis lian altan aĝon. Li maldungis aŭ malgradigis siajn reprezentantojn, kaj li deziris discipline puni ĉiujn kiuj iamaniere estis kaŭzintaj la malvenkon. Neeviteble Lemaire estis unu inter ili, punita per retrogradigo. La ekspedicio estis nuligita du tagojn antaŭ la planita forvojaĝo. Krome aperis neatendite iu ĝis tiam nekonata raporto, en kiu Lemaire estis akuzita pri malrespekto de la armeaj reguloj. En tiuj cirkonstancoj la nur 44-jara Lemaire petis sian pensiigon, turnis sian dorson al la intrigoj de la reĝo kaj retirigis en farmbieno en la regiono de Spa. La pensia stato nun ebligis al li disponi pri abundo da libera tempo por studi, verki librojn, okupi sin pri lingvoj, k.a. En la komenco li ankoraŭ skribis multajn gazetartikolojn pri Kongo; poste ne plu. Inluite de kelkaj francaj Esperanto-aktivuloj li lasis sin konvinki pri kontribui al transformado de la lingvo al alia formo, io kio en la fino de 1907 kondukis al la Ido-skismo, en kiun li ankaŭ englutigis. Poste li volis propagandi tiun transformitan lingvon, preferante nomi ĝin Ilo, sed baldaŭ konstatis ke tiu transformiĝo-movado kondukis en sakstraton. La rezulto estis ke li komplete izoligis de ĉiu ajn movado por internacia lingvo.

Rehabilitiĝo: Post la mondmilito la belga registaro fine (1919) volis realigi tion, kion ĝi jam intencis kiam ĝi transprenis en 1908 la Kongo-ŝtaton de Leopoldo 2-a, kaj por kio Lemaire daŭre estis pledinta: krei kolonian altlernejon universitatnivelan por tie serioze prepari la homojn kiuj iros administri en la Belga Kongo. Por gvidi tian lernejon oni bezonis homon kun grandaj spertoj kaj scioj kaj kun notinda kariero en Afriko. Neniu pli bone meritis tiun funkcion ol la tiam 57-jara Lemaire. En tiu altlernejo li mem instruis du fakojn: **kartografion**, pri kio li havis grandajn sciojn, kaj **deontologion**, fako kiu laŭ li estis ege necesa por ke la novaj administrantoj sciu, kiel ili devas honeste kaj homame konduki en la kolonio. En 1923 inaŭguriĝis la novaj konstruaĵoj (kiuj ankoraŭ ekzistas, nun kiel parto de la universitato, kaj estas destinitaj por la evolulandoj). Lemaire estis respektata kaj ŝatata direktoro, vera patro por siaj studentoj. La nova tasko postulis ĉiun lian energion kaj lian tempon malprofite al lia sanstato. Ne plu estis tempo por filozofio, por libroverkado, por ideoj pri internacia lingvo ... Lia vivo finiĝis iom neatendite nokte el la 20-a je la 21-a de januaro 1926.

La meritplena homo: Se oni diras ke la vivo de Lemaire estis meritplena, oni certe ne troigas. Oni konsciu, ke tiu vivo komenciĝis en plej malfacilaj cirkonstancoj en mizera vilaĝo de karboministoj, kie li jam frue perdis siajn gepatrojn. Nur danke al memdisciplino la instruado povis bone okazi kaj konduki al la Armea Altlernejo. Jam frue li akceptis la alvokon disponigi sin por la danĝera vivo en Afriko. Jam frue en sia Afrika kariero li konsciis, ke la indiĝenoj estas respektindaj homoj, de kiuj oni povas multon akiri, se oni estas honesta kaj korekta por ili, kaj li daŭre komunikis tion. Li ne hezitis konfesi ke li hororis kiam li relegis tion kion li estis farinta en sia unua Afrika periodo. Lia dekjara (kvankam multe interrompita) propagando por la ideo de internacia lingvo ankaŭ estis pionira, speciale en Belgio, sed ĝi finiĝis en la sakstrato de la Ido-skismo kaj en komplete seniluziigo. La arkivo de liaj notlibroj, leteroj, raportoj k.a., konservata en la Reĝa Belga Muzeo pri Centra Afriko (en **Tervuren**) estas unu el la plej valoraj informfontoj pri la stato de Centra Afriko ĉirkaŭ la jaro 1900. Fama restis lia eldiraĵo al la studentoj: (tradukite) Bona administranto estas tiu, kiu observas ĉion, rimarkas ĉion, notas ĉion. Lemaire estis fiera pri rekono de siaj meritoj. Tio klare evidentiĝas el la indikoj sur la titolpaĝo de la libro *Tra Mez-Afriko - A Travers l'Afrique centrale*, kie (en la franca lingvo) 16 honortitoloj estas listigitaj.

Poste li akiris eĉ pli imponajn. En 1898 la esploristo **Adrien de Gerlache** kun sia ŝipo *Belgica* sukcesis kiel unua traveturi kanalon en **Antarkto**, kaj honore al Lemaire nomis ĝin la **Lemaire-markolo**. Lia naskiĝvilaĝo Cuesmes honoris lin en 1937 per bareliefo kaj per stratnomo. **Zamenhof** nomis lin "la vera patro de Esperanto en Belgio". Okaze de la centjariĝo de Esperanto en Belgio (decembro 1997) lia persono estis memorita en kelkaj gazetoj.

Vikipedio

LOUIS DE BEAUFONT, UNUA FRANCA ESPERANTISTO DE 1888

Louis DE BEAUFONT estis la unua **franca Esperantisto**. Li aliĝis al Esperanto jam en printempo de **1888**, kaj tuj komencis propagandi en la regiono de **Toulouse** kaj **Albi**. Li eldonis sian unuan esperantlingvan libron en januaro **1892**, *Languue Universelle Esperanto. Manuel complet*, la unuan lernolibron por francoj. En **1893** li eldonis libreton *Preĝareto por Katolikoj* sub la **imprimaturo** de la ĉefepiskopo de **Reims**. Li fondis en januaro **1898** la revuon **L' Esperantiste** kaj **SPPE**, kiu en Francio motoris la fondon de la unuaj grupoj kaj la organizon de instruado pri Esperanto. Ekde la fondo li prezidis tiun societon, el kiu li ekŝiĝis en **1908**. Li estis la unua homo, kiu ellaboris plenan **gramatikon** de Esperanto, klarigante la manieron esprimi en bonstila Esperanto la naciajn **parolturnojn**, kaj tiamaniere eviti la danĝeron de naciaj dialektoj en Esperanto mem. En la daŭro de kelkaj jaroj (**1892-1905**) li eldonis tutan serion da lernolibroj, ekzercaroj kaj vortaroj, i. a. la faman *Commentaire sur la grammaire Esperanto*, **1900**. Beaufont altiris al Esperanto multajn eminentajn kaj influajn personojn kaj diversajn asociojn. Pro sia aktiveco, li estis nomata "La dua patro de Esperanto". Dum multaj jaroj, Beaufont estis rigardata de ĉiuj esperantistoj kiel unu el la plej severaj konservativuloj, neniam uzinta sian influon sur Zamenhof kaj sian aŭtoritatecon super la samideanoj, dum la daŭro de pli ol 20 jaroj, por elparoli la plej malgrandan vorton favore al reformoj. **Carlo Bourlet** eĉ nomis lin "granda inkvizitoro" pro lia troa konservantivemo. En **1894** Beaufont estis kontraŭ reformoj en Esperanto, dum tiujara balotado, tial oni ne komprenis, kial en **1908** li konsentis pri la grandskala reformado kiu kondukis al la lingvo publikigita sub la nomo **Ido**.

La malkonkordoj inter Zamenhof kaj Beaufont temis ne pri lingvaj aspektoj, sed pri movadaj aferoj, ĉefe pri **Homaranismo** kaj **interna ideo**. Ankaŭ kiel tre katolika homo, al li ne plaĉis la religiaj ideoj de Zamenhof. Beaufont volis ke Esperanto estu ĉefe komerca lingvo kaj provokis la **deklaracion de Boulogne**, kaj ŝajnis al multaj homoj ke li estas advokato de neŭtraleco kaj racio kontraŭ la revemo de Zamenhof.

Antaŭ esperantiĝo: Louis de Beaufont [**lui de bofron**], (kromnomo de Louis Eugène Albert CHEVREUX), **Markizo** de Beaufont, **franca** instruisto **esperantista**, naskiĝis en **1855** en **Parizo**, mortis en **Thezy-Glimont**, sude de **Amiens** en **1935**. La vivo de Louis Chevreux/de Beaufont (kiu uzis ankaŭ aliajn antaŭnomojn) antaŭ lia esperantiĝo estas iom mistera. Li naskiĝis en **Parizo**; lia patrino estis **Louise Armande Chevreux**, kiu naskiĝis en **Blandy-les-Tours**. La nomo de lia patro ne estas konata. Ŝajnas ke kiam Louis estis dekdujara, lia patrino mortis. Li poste loĝis kun parencoj. **Zamenhof** pridubis la pretendon, ke li estis **markizo**. Pri liaj studentaj jaroj malmulto fidinda estas konata. La rakonto pri lia juneco en la **Enciklopedio de Esperanto** estis bazita sur artikolo en la **idolingva** revuo *Progreso* kiun Beaufont mem verkis pri si, kaj kiu ŝajnas enhavi aferojn nepruveblajn.[1] Ankaŭ la onidiro pri reĝo de Belgio, kiel aliaj, tre verŝajne estis kreita de Beaufont mem. Tamen estas klare, ke lia lingvoscio estis ampleksa. Post gravega **tifo**, li fariĝis privata instruisto, loĝanta en la domoj de la familioj kies gefilojn li instruis. Li poste diris ke dum tiu tempo li provis realigi internacian lingvon per sistemo, kiun li nomis **Adjuvanto**, sed la manuskripto,

deponita ĉe notario, malaperis (laŭdire pro detruo aŭ ŝtelo). Iam antaŭ sia esperantiĝo li adoptis la nomon Beaufront.

Adepto de Ido: Pro la tuja konvertiĝo de de Beaufront al Ido, eĉ plie pro lia konfeso de autoreco, la esperantistoj ekinteresiĝis pri la negativaj aspektoj de lia aktiveco. Plejparte, do, la esperantistoj emfazis la rolon de de Beaufront; sed akcesoraj psikologiaj eksplikoj atribuas la skismon al persona orgojlo flanke de la ĉefoj de ambaŭ tendaroj, precipe **Wilhelm Ostwald**, **Louis Couturat**, **Émile Boirac** kaj **Zamenhof**. **Louis Couturat**, kiel juĝisto de la **Delegacio por alprenado de la lingvo internacia** ne rajtis prezenti sian propran projekton; tial ĝi estis anonime prezentita sub pseŭdonimo "Ido". Ĉar la aŭtoro ne povis ĵeti mem la maskon, Beaufront konsentis fariĝi lia **pajlohom** kaj deklaris: «Mi estas Ido». La vero pri tiu afero estis malkovrita post la unua mondmilito, kiam la vidvino de Couturat petis **Ric Berger**, ke li zorgu pri la paperoj lasitaj de ŝia edzo. Beaufront fariĝis la ĉefa gvidanto de la **Ido-movado**, sed en januaro 1917 la sekretario kaj kasisto de la "**Unio dil Amiki di la Linguo Internaciona**", redaktis alvokon al Unionanoj kaj aliaj Idistoj, atentigante la oficialan formon de Ido laŭ la laboroj de la Ido-Akademio kaj petante sendi la kotizojn por la pasintaj militojaroj. Respondo al tiu alvoko estis artikolo de Beaufront en julio, per kiu li postulis »la desparado dil Unio e di lua komitato« (malaperon de la Unio kaj de ĝia komitato) pro la psikologia situo dum kaj post la milito kaj konsideris »omna rivivigo ... kom neoportuna, danjeroza e mem neposibla« (ĉian revivigon ... kiel neoportunan, danĝeran kaj eĉ neeble), ankaŭ pro statutaj argumentoj. Baldaŭ aperis la kontraŭopinio esprimata de Svisoj kaj Aŭstroj, sed Beaufront retenis sian vidpunkton kaj antaŭvidis nur la renaskon de la Ido-akademio.

La Ido-movado reviviĝis militofine, kvankam en aprilo 1919 Beaufront ripetis en Mondo sian vidpunkton pri la »fakta morto« de la Unio, sed ne de la akademio, kaj konsideris kiel vanan la pruvon revivigi ĝin. Dum pluraj semajnoj nenio okazis internacie, sed la naciaj societoj rekomencis labori kaj propagandi. En septembro Bakonyi kiel sekretario de la Unio, rimarkante la kreskan intereson de oficialaj aŭtoritatoj pri lingvo internacia, rekomendis al komitatanoj kaj akademianoj repreni siajn postenojn kaj proponis konsideri kaj rigardi la opinion de Beaufront kiel ekziĝon. Sekve, li disiĝis de la **Ido-movado**. Beaufront mortis en 1935 preskaŭ forgesita kaj lian forpason eksciis nur partianoj de **Okcidentalo**, kiuj retro-ricevis al li senditan ekzempleron de *Kosmoglott* kun mencio, ke li mortis kaj ke oni ne scias, al kiu oni transdonu la sendaĵon. Vere, oni ne certas eĉ pri lia morto. Lia tombo, sennome, situas en la vilaĝo **Marestmontiers**, sude de **Amiens**.

Wikipedia

MIA ESPERANTISTECO (unua parto)

Mi estis 15-jara, kiam mi eniris posttagmeze en la bibliotekon de la Franciskana Seminario de Rionegro, Paranao, municipo kaj urbo de Brazilo, certe la centan fojon, ĉar mi estis muso de biblioteko, kaj haltis antaŭ etaĝero en kaŝita loko. Tie mi etendis la manon, kaj kaptis libreton, kiu kaptis min por la resto de mia vivo: BEHRENDT, Arnold. Die Esperantosphache. Breslau: memeldono, 1912, 14 paĝoj. Multaj el miaj kunseminarianoj estis germandevenaj, kaj

ne unuafoje germanis en siaj balbutoj. Mi do pro tio komprenis, ke la titolo temis pri la lingvo Esperanto. Jam en tiu tempo mi lernis kelkajn lingvojn, precipe la francan, la latinan kaj la grekan, kaj sciis pri multaj aliaj, sed neniom pri tiu Esperanto. Restis al mi nur iri al la unua trovita pastro, ĉar ĉiu el ili estis por mi sinonimoj de la sciopleneco:

- Pastro Tadeo, kio estas la lingvo Esperanto?
- Lingvo de la tuta mondo.
- Kie ĝi estas parolata?
- En la tuta mondo...

- Ĉu vi parolas ĝin?!

- Frato Rejnaldo parolas.

La respondoj estis tiel mallongaj kaj miaj scideziroj estis tiel longaj, ke mi pensis, ke pli bone estas iri al la libro kaj demandi de ĝi la konojn, kiuj nur gutis el Frato Tadeo. La unua paŝo estis la unua baro: la germana lingvo. Tio tamen estis nur momenta problemo, ĉar alia seminariano parolis la platgermanan ĉe sia familio, kaj li bonvolis studi kun mi. De tiu tago li kaj mi ofte troviĝis kune, sed tio kostis al ni iom da konsiloj, ĉar la rigidaj reguloj postulis trion, malofte duon kaj neniam unuon: Neniam unu, malofte du, ĉiam tri. Tiun trian ni neniam trovis, sed akcidento transformis la duopon en unuopon. Efektive, unu vesperon (ni havis kelkajn liberajn minutojn dum la vespero, post la manĝo) mia kolego diris al mi alarmite:

- Ni iru konfesi nin, ĉar ĉi tiu estas malpermesata libro, peka...

Kaj konsternitaj, ni iris al unu el la fratoj, cetero tiu sama, kiu klarigetis al mi, kio estas Esperanto:

- Ni devas konfesi, ke ni legis ĝis nun kelkajn paĝojn de ĉi tiu libro, kiu estas nebona. Ĝi parolas pri nedecaj aferoj: publikulinoj... pekaj virinoj!

- Kaj kie vi trovis ĝin?

- En nia biblioteko...

Frato Tadeo ekridis:

- Nekredeble.

Kaj ni remetis:

- Kredeble. Jen.

Kaj ni malfermis la libron. La manoj iom tremis pro la malvarmeco de la peko kaj la timo al la varmeco de la infero, se li kaj mi insistus kaj persistus en tia malmorala libreto:

- La leciono komenciĝas pere de vortareto, kaj tie estas skribite tute klare: Fraŭlino: Fraulein [frojlaĵn].

La pastro certe ne komprenis la germanan, kvankam li estis germano el Germanujo...

Tio estis absolute certa por ni, ĉar li tuj rediris al ni:

- Mi vidas tie nenion malsanktan...

Kaj nun ni restis subite senparolaj, senkredaj, senagaj, efektive tute

ĉiosenaj... Kiel povas esti, ke pastro ne scias, kion signifas la vorto Fraulein? Ĉu li estas tiel senkulpa kaj senpeka, ke li ne konas la famon... de tiuj virinoj?!... Mia kolego iom balbutis la klarigon, la vangon tute ruĝa kaj la korpon tute trema, la voĉon tute basa kaj la tekston tute duobligita silabon post silabo, sed tion mia afabla leganto nur imagu mem por eviti al si mem langotordon (mi suferas de memeco!):

- Frato Tadeo, Fraulein estas putino!...

Kaj mia paciencema legulo (mi esperas havi legulojn, ne nur legantojn) permesu al mi la sekvantan interparentezan digresion, kaj bonkore bonvolu (mi suferas de boneco!) iri al la fina propozicio de la antaŭlasta alineo: ... sed tion mia afabla leganto nur imagu mem por eviti al si mem langotordon. Mi estas stulta kaj senatenta, pli da unua ol da dua... Se mi ripetis la legitan kaj komentotan propozicion, kial pro la diablo mi sendis mian sentempan legiston (ho se mi havus tiajn!) al la fino de la antaŭlasta alineo?!... Mi tamen ne tro etendu ĉi tian ekstertemaĉon. En tiu benita propozicio (tiu benita estas certe brazilanismo), aperas la vorto leganto, kiun multaj el niaj parolantoj ĉanĝus al legonto, ĉar ili pensus per verboformo, ne per participo: ... sed tion tiu, kiu afable min legos, nur imagu mem por eviti al si mem langotordon. Lamentinde, legonto neniam povas imagi al si ion estantan en estonta legado... ĉar ĝin li ne legis! En la fino, ĉiu loĝanto de nia tuta mondo estas unu el la eblaj legontoj... sed tion ni scikonos nur en la momento, kiam ili eklegos, pli malkabel: kiam ili estos eklegintaj!

Mi forte esperas, ke ĉiu havu en la manoj la fadenon de Ariadna por konstati, ke nun mi reiras al mi historio...

Pastro Tadeo, pastrigonta kaj panfaranta laboristo en sia juneco, li nun vere eksplodis per ridego. Klara ridado, kiu informis nin, ke li frenezigiĝis pro la konscio de nia peko, kaj eĉ ne povis facile absolvi nin... Kiam la ridego estingiĝis, kiel kandelo post viva

ventoveno, li komprenigis al ni nian lingvan konfuzon:

- Ho ve al vi, vermuloj.

Ĉar ni interparolis portugallingve, li ja ne alsakris nin per tiu lasta vorto, sed nun mi rekreas tian situacion havitan en koridoro de la Seminario, kaj pensas pri ĝi verde ĝuste pro tio, ke tiu lasta vorto bone vidigas nian tiaman perpleksecon: vermulo estas stranga duoblaĝo, en kiu loĝas ulo de vermo kaj mulo de la vero...

Li plu gestis kaj sin manifestis sen atento pri mia nuna digresio:

- Fraulein estas nur virino, kiu ne edziniĝis.

Ni restis mutaj kaj brutaj.

Post tiu incidento, mi restis unuopo dum tre mallonga tempo. Efektive, nelge (simpla mallongigo de la vorto nelonge) poste, la duopo restariĝis:

Gersi Alfredo Bays miraklis en mia vivo. Fakte, miraktis (1).

(1) *Noto: Kabe, nia plej fama stilisto, abomenis tiajn kunmetitajn verboformojn.*

En tiu tempo, eble nur post kelka ioma tempo, okazis mia unua disrevigo pro alies diro kaj egale mia unua disreviĝo pro mies aŭdo. Mi jam sufiĉe malbone parolis tiam Esperanton, kaj mi memoris la informon de frato Tadeo pri Frato Rejnaldo, ke li parolas Esperanton. Mi do aliris al li per demando, kiun mi zorge formulis (Ho, mia Zamĉjo! denove for mulo...) en mia menso:

- Ĉu vi parolas la lingvon Esperanto?

Kaj mi ĵuras, ke mi metis la vorton lingvo en akuzativon kaj la vorton Esperanto en nominativon, sed tion mi ŝuldis al la latina lingvo, en kiu mi respondis al la tri demandoj de la trioblaj ĉiujaraj ekzamenoj de la studobjekto pri religio. Eĉ en la latina, mi emis al nekutimaj vortoj: mi neniam uzadis la vorton momentum, momenti, sed nur la poezian kaj altsonoran momen, mominis... por la granda konsterno de Frato Tadeo, kiu riproĉis min ĉiufoje:

- Kian difcilan lingvon vi skribas...

Kaj mi prenis la vorton difcila nur por pardonigi al mi mian tiaman disreviĝon, kaj eble pro tio, ke nun mi juĝas tiun

11
uzitan vorton vere bona, ĉar ĝi estas difacila! Ho mia Zamĉjo, mi perdis min sur la vojo de mia rakonto...nen: de mia rakanto!...finfine, mi jam komencis ĝin kaj ĝin ne finis [bona kvinjambo, portugallingve deksilaba verso: mi jam komencis ĝin kaj ĝin ne finis], sekve ...-anto, ne ...-onto. Mi do nun deturnu min de la devia vojo, ĉar ne mia, se de via, kaj revenu al la nova bojo. Frato Rejnaldo estis sur la sama loko en la sama koridoro, kiu dekretis la finon de la unua duopo, kaj eĉ ne haltigis sian iradon al la proksima futbala kampo. Li nur sputis:

- Poke.

Tia vorto, mi ĝis tiam ne estis vidinta ĝin [mi ĵus praktikis kaj pleonasmon kaj anakoluton, kaj la kvar lastaj vortoj estas deksilaba prozaĵa verso...]: mi konis nur la antonimon malmulte. En tiu tempo mi ĉion ignoris pri la kaloĉaja kaj varingiena poezia terminaro, kaj mi mem enmetis en miajn unuajn poeziaĵojn kelkajn ne ekzistantajn en Esperanto vortojn (kaj jen mi misgermanigis mian ordinare latinecan verdan stilon, vere misgermanigo, ĉar la vera germanigo verŝajne postulus alian vorttordon: kelkajn en Esperanto ne ekzistantajn vortojn). De tiam la vorto poka estas unu el miaj malmutaj (ne malmultaj, sed ja mem malmutaj) naŭzaĵoj, por kiu miaj oreloj kaj mia gorĝo obstrukciĝas...*daŭrigota*

Geraldo Mattos Gomes dos Santos,
eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto (ĝis 2007)



12

MI NE ZORGAS PRI RIMOJ

Mi ne zorgas pri rimoj.

Malofto estas du egalaj arboj, unu apud la alia.

Mi pensas kaj skribas, kiel la floroj havas la kolorojn, sed malpli perfekte en mia maniero esprimi, ĉar mankas al mi la dia simpleco esti nur ĉio mia eksterajo.

Mi rigardas kaj emociiĝas, emociiĝas mi kiel la akvo fluas sur klinita surfaco, kaj mia poezio estas natura kiel ekventiĝo...

Alberto Caeiro, alia nomo de Fernando Pessoa
el la portugala tradukis João José Santos
literatura reta revuo "La Karavelo", Estremoz, Portugalujo

ETERNA PUNO

Jen la pekulo ĉe la lasta horo:
li ĝemas, turmentiĝas, agonias,
ĉar la rimorso karnoŝire krias
ĝis plej interna parto de la koro.

Ho Dio de justeco kaj rigoro,
pri via juĝorajto mi konscias:
al ĉiu, kiu dum la viv' orgias,
vi sendas ĝustan sumon da doloro.

Kvankam tremigas via man' terura,
El mia sento ne naskiĝas timo
Al la infero kruda, sed ĥimera,

ĉar al kreito, nano kaj viktimo
de vivo, ja ne donos JustoVera
eternan punon pro momenta krimo!
Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Brazilo,
eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto (ĝis 2007)

FLUGI INTER NUBOJ EL SONGŬO

Sonĝi en la sonĝo per malklara koncepto, en pura fantazio, estas kiel bela sinfonio flugante supre pejzaĝo mara aŭ sento-sugestio amara; estas, de la spirito la vero, en la enigma-nokta ĥimero; estas la konsolo de la vivo kaj de la imago, la motivo; sed ankaŭ estas, Regi, mistero.

Ve, sonĝoj, sonĝoj!, kiuj kunigas nian revo-velan fantazion; kaj niajn priokupojn dormigas flugante en edenan pasion....

...”Rempas el la buŝo niaj langoj serĉante unu al la alia; kaj, kiel transfuzoj de sangoj ili miksiĝas en l' buŝo nia.”

“Niaj langoj ligiĝas per ŝnuroj, en l' dolĉa groto de via buŝo kiel serpentoj en suka-spuroj de senfina ampetola tuŝo.”

Mia koro, en la via nestas;
mia buŝo, ripozas en l' via;
mia sonĝo, kun la via estas;
kaj via sopiro, estas mia.

En la nigra nokto interĝriĝas
en mia sufersonĝo, eteraj
bildoj, kiuj rapide fandiĝas
en l'enigma sonĝo-senesperaj.

Teruraj bildoj kiuj turmentas
mian dormon, kaj kiel gangreno
putra, en la korpo, sin prezentas
kiel sonĝa kruela veneno.

Ĉio kiu en l' nokto miksiĝas:
sonĝoj, veroj, revoj, fantazioj;
sufersonĝoj kaj melankolioj;
ĉio ĉi mortas kiam tagiĝas.

Finfine: kio estas la vera realeco?, kaj l' sonĝo?: silento.
Ne scias respondi mia sento.
Sed pere de mia karaktera medito la respondo libera de mia filozofia scio povas diri, laŭ mia konscio, kaj mia intuo kora inklino, ke la nura vi estas, Regina, mia vero kaj sonĝo-fikcio.

Ŝekspiro diris:”jen la afero: esti aŭ ne esti”; kaj mi: vero aŭ malvero. Nur vi en mi nestas kaj do, nur vi, mia vero estas.”

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

NATURA KATASTROFO NULIGIS IJF

La itala urbo L'Aquila kaj la regiono Abruco estis frapitaj, frumatene la 6an de Aprilo 2009, de katastrofa tertremo, kiu mortigis ĉirkau tricent homojn kaj senhejmigis pli ol dudek mil homojn. La okazaĵo kauzis, interalie, la nuligon de la ĉi-jara Internacia Junulara Festivalo, kiu devintus okazi en Giulianova (apud Teramo). Esperantistoj de Belgujo kiuj jam partoprenis lastjare en Senigallia (apud Ancona) ne povis ĉeesti ĉi-jare. La festivalejo estis uzata por loĝigi senhejmigitajn maljunulojn el la provinco de L'Aquila. IJF-teamo anstataŭigis la festivalon per volontula agado de

13 kolektado de rimedoj tra la urbaj vendejoj. Jam dum la 7a kaj la 8a de Aprilo, danke al la donemo de la Julianovanoj, Itala Esperantista Junularo kolektis ĉirkau 500 kg da pastaĵo, 80 litrojn da lakto, 100 kg da tomatsaŭco, 200 kg da ladskatolaj manĝaĵoj, kaj rimedojn por infanoj, kiel ekzemple vindotukoj kaj homogeniĝaĵoj. Por ke ĉiuj, en kaj ekster Esperantujo, povu oferti sian helpon al la frapita regiono Abruco, Itala Esperantista Junularo kaj Itala Esperanto-Federacio nun estigas bonfaran monkolekton kiu celas ekonomie helpi la rekonstruadon de la urboj trafita de la katastrofo.

Esperanta informado N° 48, Andrés Martín, Malaga, Andaluzio

ESPERANTISTOJ EN PLACO SANKTA PETRO

En la Placo Sankta Petro de Vatikano, Romo, Italujo, je la 12a de Aprilo 2009, Papo Benedikto la 16a adresis, post Paska mesaĝo, bondezirojn en 63 lingvoj. En Esperanto li diris: *Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta*. La bondeziron en esperanto akceptis ĝojoplena kriego de la esperantistoj kiuj ĉeestis en placo sankta Petro por la dek-sesa sinsekva fojo. Ĉi-foje la grupeto estis pli nombra ol kutime: aldoniĝis kelkaj gejunuloj el pluraj landoj: ili venis al Italujo por partopreni en la paska junulara festivalo en regiono Abruco, sed ĝi estis nuligita pro la tertremo. Iliaj paneloj kiuj konsistigis la vorton esperanto aperis tutklare en la monda televida elsendo, dum du fojoj.

Esperanta informado N° 49, Andrés Martín, Malaga, Andaluzio, Hispanujo



Maldekstre dekstren: Jitka Skalická (E), Laura Brazzabeni (S), Elio Bonomolo (P), Francesco Maurelli (E), Gianni Conti (R), Renato Corsetti, Marek Blahuš (A), Patrizio Cilli (N), Giovanni Daminelli (T) kaj Arturo Bau (O).

14

NOVA RAPORTISTO PRI PROJEKTO BUARQUE EN LA BRAZILA SENATO

Nova raportisto estis nomumita en la komisiono pri edukado de la brazila Senato por analizi la proponon de senatano Cristovam Buarque pri enkonduko de Esperanto en mezlernejoj. La rolo estas subteni au malsubteni ĝin per raporto al la pleno de la komisiono. La antaŭa raportisto, Marcelo Crivella, kiu donis ĝenerale favoran subtenon, ne plu apartenas al la komisiono. Tial lia raporto senvalidiĝis sed estos inkluzivita en la dosiero. La nova raportisto estas senatano Mozarildo Cavalcanti, el la Brazila Laborista Partio (PTB), 64-jara kuracisto kaj senatano por la federacia ŝtato Roraima (la plej norda en Brazilo). Oni ne konfuzu tiun partion kun Partio de Laboristoj (PT) de ŝtatprezidanto Lula. Ankau PTB estis subtenanto de la registaro, sed laŭprograme la partioj estas ege flekseblaj en Brazilo. Oni povas priskribi ĝin mezodekstrisma, malgraŭ la nomo... Indas sendi mesaĝojn, petante lian subtenon al Esperanto:

mozarildo@senador.gov.br

Lia paĝaro: <http://www.senado.gov.br/web/senador/Mozarild/noticia.asp?data=09/12/2008&codigo=48824>
James Rezende Piton, Brazilo



ESPERANTAJ EVENTOJ



Foto de Kongreso de SAT-Amikaro en Pau, Suda Francujo, 157 partoprenantoj, 10-14 Aprilo 2009



Partoprenantoj el Belgujo en Pau: Jakvo Schram, Diemante Aničiene, Clémentine Staquet, Marlène kaj Arie Bouman, Paulo Branco



Staĝo Regiona de Elzaso-Loreno-Vosgezo, Orienta Francujo, 54 partoprenantoj, 20-22 Marto 2009



Partoprenantoj en la konferenco de Kristin Tytgat dum la menciita staĝo



Duria Plonĝado, 5a Ibera Renkontiĝo, en Oporto, Portugalujo, 34 partoprenantoj, 6-8 Marto 2009

FRANÇOISE PELLEGRIN



Daŭra gvidantino de lingvaj kursoj en Esperantista Brusela Grupo